

PANORAMO-INFO

*Sciiga letero por la Esperantistaro
en Saksio-Anhaltio*

14-a jarkolekto

2005-2



***Ne forgesu: REVO
17-an de septembro 2005
ni renkontiĝos 10:00h ĉe la
urbodomo de Wörlitz***

Ni iros vojon, kiun ni ne iris dum la lastaj dek jaroj: paralele de la sunkanalo, ni vidos la templon Pantheon kaj Herder-insulon. Ankaŭ la laboroj ĉe „Vesuv“ estas finitaj. Malkovru preskaŭ nekonatan parton de la parko de Vorlico.

Se vi bezonas pliajn informojn,
demandu la Esperanto-grupon Panoramo
(*kontaktinformoj sur la lasta paĝo*)



la templo Pantheon



Projektsemajno en Burg

Kvin entuziasmaj gimnazianoj en Burg elektis la temon Esperanto por la projektsemajno antaŭ la ferioj. Ĉiuj lernas ankaŭ la latinan; pro tio ili kuraĝis mem prepari ĉion per kolekto de materialo en la reto. Multaj informoj estas akireblaj el la libera reta enciklopedio Vikipedio. Ili legis kaj tradukis Esperanto-takstojn kaj ellaboris superrigardon pri la gramatiko de nia lingvo. Kristjan kaj Jörg iom helpis al la grupo per respondo al iliaj demandoj pri kulturo kaj evoluo de Esperanto.

Bedaŭrinde ne okazis la Cseh-kurso antaŭ la IJK en Zakopane pro manko de aliĝoj; en alia okazo la lernintoj eĉ partoprenus la kuson kaj la kongreson en internacia etoso.


Kiel rezulto de la projektsemajno estis la decido de la lernantoj fondi laborgrupon pri Esperanto komence de la nova lerneja jaro.

Joseph von Eichendorff (1788-1857)

Joseph von Eichendorff (kun plena nomo Karl Benedikt Freiherr von Eichendorff) naskiĝis la 10-an de aprilo 1788 en la kastelo Lubowitz ĉe Ratibor. Li devenis el malnova katolika, feŭda gento. Ekde 1805 li studis juron kaj filozofion en Halle, Heidelberg kaj Vieno. Renkontiĝoj kun Clemens von Brentano, Heinrich von Kleist kaj Adam Heinrich Müller, la vizito de la prelegoj de Joseph Görres (en Heidelberg) kaj la forta kontakto al la familio de Friedrich Schlegel (en Vieno) ege influis la junan Eichendorff. En la jaroj 1813 kaj 1815 Eichendorff aktivis en la militoj kontraŭ Napoleono, ekde 1816 li estis oficisto en Prusio: unue en Breslau, ekde 1821 en Danzig, post 1824 en Königsberg (hodiaŭ Kaliningrad), fine de 1831 ĝis pensioniĝo en la jaro 1844 en Berlino.

Eichendorff estas unu el la plej gravaj verkistoj de la germana romantikismo. Kaj pri poemoj kaj pri rakontoj li estis same talenta. Liaj poemoj kaj rakontoj temas pri centraj motivoj de romantikismo (sopiro al naturo, novaj impresoj kaj hejmo). Laŭ la literatura fikcio iam ekzistis paradiza stato de perfekta harmonio inter homo kaj naturo (*Ora Epoko*). Nuntempe inter homo kaj naturo estas fremdeco kaj restis nur kaŝita memoro pri la iama paradizo. Per revivigo de la memoro la homo korektu la evoluon kaj reakiru la mondan harmonion.


La poemoj de Eichendorffs ricevis melodion de multaj komponistoj, inter aliaj de Robert Schumann kaj Hugo Wolff. La 26-an de novembro 1857 Eichendorff mortis en Neiße.



Eichendorff-skulptaĵo en Ratibor, farita de Johannes Boese (1856-1917)

fonto de la informoj: DATA Becker Lexikon 2005, Multimedia DVD.

jogo



la burgo Giebichenstein

Udo Birkner tradukis faman poemon de J. von Eichendorff, kiu rilatas al burgo Giebichenstein en Halle. Jam dum la tempo de Eichendorff la burgo estis ruino.

Joseph von Eichendorff

Da steht eine Burg über'm Thale

Da steht eine Burg über'm Tale
und schaut in den Strom hinein,
das ist die fröhliche Saale,
das ist der Giebichenstein.

Da hab ich so oft gestanden
und ich sah die Täler und Höh'n
und seitdem in allen Landen
fand ich nimmer die Welt so schön.

Durchs Grün da Gesänge schallten,
von Rossen, zu Lust und Streit,
sahen viel' schlanke Gestalten
gleichwie in der Ritterzeit.

Wir waren die Fahrenden Ritter,
eine Burg war noch jedes Haus,
es schaute durchs Blumengitter
manch schönes Fräulein heraus.

Das Fräulein ist alt geworden,
und unter Philistern umher
zerstreut ist der Ritterorden,
kennt keiner den anderen mehr.

Auf dem verfallenen Schlosse,
wie der Burggeist halb im Traum,
steh' ich jetzt ohne Genossen
und kenne die Gegend kaum.

Und Lieder und Lust und Schmerzen,
wie liegen sie nun so weit --
o Jugend, wie tut mir im Herzen
mir deine Schönheit so leid.

Staras burgo super valo

Staras burgo super valo,
vidas en la riveron kaj
rivero estas gaja Saale,
burga nomo: Giebichenstein.

Ofte jam mi staris tie,
kiel sur la aera ond'
similan belan lokon trovis
mi nenie en la mond'.

Tra la verdo oni kantis
je la emo kaj batal',
kiel en tiama tempo
kavaliroj kun ĉeval'.

Kavaliroj ja ni estis,
estis burgo ĉiu dom',
ofte vidis tra la floroj
bela juna ina hom'.

La fraŭlino maljuniĝis,
kavaliroj estas for,
vidas nun ĉe tiu loko
fremdaj homoj tra la flor'.

En la trista burgruino
kiel kobold' en la rond'
staras mi sen kamaradoj
forlasita de la mond'.

Kantoj, emo kaj doloroj,
multaj jaroj pasis nun,
en la koro, ho juneco,
revas mi al via lum'.



la rekonstruita Frauenkirche

Dresdeno

La 18an de junio 2005 la Esperanto-grupo Panoramo ekskursis al Dresdeno. Venis ankaŭ Esperantistoj el la ĉirkaŭaĵo de Dresdeno kaj estona samideanino. Entute kolektiĝis 14 personoj. Tra la belega centro de la urbo gvidis nin la profesia ĉiĉeronino Sabine Herda. Nova vidindaĵo estas la rekonstituita Frauenkirche (Virinpreĝejo). El antaŭaj jaroj mi ankoraŭ konas la ruinajn restaĵojn. En *Esperanto-Centro Marie Hankel* s-ro Wolfgang Schwarz montris al ni kelkajn valoraĵojn de la arkivo (ekzemple la originalan kongreslibron de Marie Hankel de la UK en Dresdeno 1908). Posttagmeze Benoît Philippe invitis nin al la domo *Abu Sina* por frandi bongustegajn kukojn kaj trinki kafon aŭ teon aŭ fruktajn sukojn. Ni multe dankas al la organizantoj en Dresdeno por la sukcesa renkontiĝo.

jogo

Lepsiko

Komence de aŭgusto Boris Kolker kaj Edzino Esther gastis en Halle. Boris Kolker estas aŭtoro de la fama libro *Vojaĝo en Esperantolando*. Ĝus aperis la tria eldono. La celo de la libro estas informi pri kulturo kaj historio de Esperanto. Plie Boris gvidas retan pliperfektigan kurson.

La 6an de aŭgusto ni (Siegfried kaj Jörg) akompanis ilin al Lepsiko por montri al ili la urbocentron. Bedaŭrinde la beleco de Lepsiko estas ĝenata de ege multaj kontruejoj, tamen ni havis agrablan tagon kun babilado pri tre diversaj temoj.

Unu temo estis Ufa, kiu estas ĝemela urbo de Halle kaj la hejmurbo de ges-roj Kolker. Eble ni povas revigli la kontaktojn al la ĝemela urbo per ilia helpo.



jogo

Koresponddeziroj el Francio

Kreskuloj el francio deziras leteramikojn:

Marie-Claude GOTH
22, Rue Clavon
F 59132 TRELON


Robert deziras korespondi per reto: robert.drique@freesbee.fr

Samuel Christian Hahnemann (1755-1843)

malgranda kaŭzo – granda efiko

En aprilo homeopatoj celebris rondan datrevenon de la naskiĝo de Samuel Christian Hahnemann, la genia inventinto de de homeopatio. Tiu ĉi nova kuracmetodo akiris jam disvastiĝon dum la vivo de Hahnemann, kaj ĝi pli kaj pli estas agnoskata nuntempe. Kvankam tiu metodo ŝajnas esti iomete stranga, tamen ĝi estas tre efika.

Hahnemann naskiĝis la 10-an de aprilo 1755, ĝuste antaŭ 250 jaroj, kiel filo de porcelanpentristo Christian Gottfried Hahnemann en Meißen. Li studis medicinon, sed li ofte ŝanĝis la studojn kaj la urbojn. Kiam li estis 24-jaraĝa li regis jam sep lingvojn skribe kaj buŝe. Baldaŭ li estis altestimata tradukisto. La studadon li financis per tradukaj laboroj. Post nekredible multstacia vivitinero tra Germanio li alvenis kiel 56-jaraĝa privata kuracisto en Lepsiko, kie li trovis iom da trankvileco. Entute li loĝis dum sia vivo en 27 urboj, inter aliaj en Hettstedt, Dessau, Gotha kaj Hamburgo. Li ofte laboris kiel privata kuracisto por riĉaj pacientoj kaj kiel tradukanto de sciencaj verkoj.



reliefo farita de Pierre-Jean David d'Angers



homeopataj medikamentoj en boteletoj kaj cilindroj, Lepsiko 1889

Krom la zorgado por sia familio kun kvin infanoj li sukcesis disvolvi novan teorion pri la funkciado de medikamentoj. Li testadis multajn substancojn en fortaj diluecoj, iliajn efikojn al klinikaj bildoj. Li observis ke substancoj, kiuj efikas ĉe sana homo bildon de iu malsano, taŭgas por kuraci pacieron kun ĝuste tiu malsano. Tiel li formulis la bazan tezon de homeopatio: Simila kuracu similan (latine: *similia similibus curantur*). En Lepsiko li devis defendi sian teorion kontraŭ multaj malamikoj. Ĉefe la apotekistoj kontraŭis lin, ĉar la medikamentoj de Hahnemann estis pli malmultekostaj ol la kutimaj. La apotekistoj de Lepsiko atingis ke Hahnemann ne plu rajtis apliki siajn medikamentojn, ĉar mankis al li unu necesa permeso por kuracistoj. En 1821 li forlasis Lepsikon kaj venis al Köthen. La princo Ferdinand permesis al li la kuracadon kaj esploradon. Tie li povis fini siajn instrukciojn pri la elekto kaj la aplikado de la novaj medikamentoj. Post 14 sukcesaj jaroj en Köthen Hahnemann iris al Parizo en 1835. Kiel 80-jaraĝa vidvo li edziĝis kun la 35-jara parizano Melanie, kiu leginte lian „Organon de racia kuracmetodo“ decidis viziti lin kaj lasi sin kuraci laŭ la nova metodo. La tempo en

Parizo estis por Hahnemann tre fruktodona epoko, kiam li ricevis mondvastan agnoskon. En la jaro 1843 mortis la grandmerita medicinisto. Ankaŭ en Vikipedio jam estas Esperantlingva artikolo pri Hahnemann.

La amikoj de la Esperanto-grupo PANORAMO de Halle havis jam trifoje la honoron, gastigi en nia urbo malgrandan grupon de brazilaj homeopatoj. La unuan fojon ili vizitis nin en oktobro 1994, la duan fojon en oktobro 2000 kaj trian fojon en marto 2002.

Elstara programero de ilia restado estis vizito de la muzeo pri la vivo de Hahnemann en Köthen. Ankaŭ rigardo de la domo de Hahnemann ĉiufoje estas interesa. La domo estas renovigata kaj fariĝos seminarejo pri homeopatio. Profesoro Izaio Carneiro Soares mem instruas la homeopatian kuracadon al studentoj kaj estras muzeon pri homeopatio en Ribeirao Preto. La retpaĝo de la muzeo estas dulingva – en Esperanto kaj la portugala.

Ni esperas pri nova vizito en oktobro de tiu ĉi jaro, sed tio ankoraŭ ne certas. Por ni ĉiu vizito de ili estas granda evento, ĉar ili povas rakonti ne nur el sia fora hejmlando sed ankaŭ pri sia vojaĝo tra Eŭropo.



de maldekstre: Jörg, Izaio, Herondina, Siegfried agro

regulaj renkontiĝoj

Eo-grupo PANORAMO - Halle:

1-a mardo, 18.00h: E.-Abderhalden-Str. 20

3-a mardo, 18.00h: Bülbergasse
(restoracio "Zum Schwarzbrenner")

4-a mardo, 17.00h: PIKO, informu vin

Eo-Gruppe Magdeburg:

ĉiu 2a mardo (ne en julio, aŭgusto),
Steubenallee 2

Eo-Klubo "Karapaco"

Zeit: Dirk Bindmann, ☎+ 03441-273251

walden@t-online.de

Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de

☎ 03447-4012

eventoj

pliaj:

<http://aliaflanko.de/kalendaro/>

<http://www.eventoj.hu>

17.09.2005 **Wörlitz**

REVO (Renkontiĝo Esperantista en VorlicO),

E-grupo Halle

24./25.09.2005 **Herzberg**

EMAS-Jarĉefkunveno

Esperanto-Centro Herzberg

30.09.-05.10.2005 **Herzberg**

Internaciaj Pedagogiaj Tagoj

ekzamenoj de GEI, ILEI

Esperanto-Centro Herzberg

07.-09.10.2005 **Herzberg**

27a Studsesio

E-fondaĵoj, historio, metodologio

Esperanto-Centro Herzberg

09.10.2005 **Pirna**

Ĉeĥa-Saksa Tago

Norbert Karbe,

03501-773232, nokosaksio@tiscali.de

22.10.2005 **Halle**

ANABEL (Aŭtuna Najbara Aranĝo kun Borso
de Esperanto-Literaturo), **E-grupo Halle**

28.-30.10.2005 **Neubrandenburg**

40a Semajnfina Esperanto-Seminario

Werner Pfennig, 0395-4221398

werner.pfennig@t-online.de

adresoj

DEB - Deutscher Esperanto Bund

Immentalstraße 3, 79104 Freiburg,

☎ 0761-289299, Info 0180-esperanto (-3773726)

gea@esperanto.de <http://www.esperanto.de>

UEA - Universala Esperanto Asocio

Ĉefdelegito por Germanio:

d-ro Wolfgang Schwanzer,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz

☎ 06136-46232, <http://www.uea.org>

SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda

Peranto por Germanio: Jiri Proskovec,

Heimbastraße 10, 44143 Dortmund

proskovec@aol.com

ELSA - E-Ligo Saksio-Anhaltio

Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,

06366 Köthen, ☎ 03496-558517

joerg.gersonde@esperanto.de

E-Grupo "PANORAMO" Halle

Siegfried Linke, Fischerstecherstr. 23,

06120 Halle, ☎+ 0345-5500348,

halle-saale@esperanto.de

<http://www.esperanto-halle.de>

E-Grupo Magdeburg

Edith Plümecke, Simonstraße 15,

39114 Magdeburg, ☎ 0391-8117421

DDungert@t-online.de

<http://www.beepworld.de/>

[members75/esperanto-dungert](http://members75.esperanto-dungert)

E-Grupo Leipzig

Werner Geidel, Karlsruher Str. 5 d

04209 Leipzig, ☎ 0341-4118577

Esperanto-Centro Herzberg

Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6,

37412 Herzberg, ☎+ 05521-5983

esperanto-zentrum@web.de

<http://www.esperanto-zentrum.de>

Literarurdienst "ESPERO"

Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18

27333 Schwering, ☎+ 04257-983223

RoBo.ESPERO@t-online.de

Bücherdienst/Libroservo

wolfgang.schwanzer@esperanto.de

<http://www.esperanto-buchversand.de>

☎ 06136-46232

PANORAMO-Info

Herausgegeben von der Esperanto-Gruppe „PANORAMO“ Halle,

fina redaktoro: Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,

06366 Köthen, 03496-558517, joerg.gersonde@esperanto.de

Bankverbindung: August Grosch, Kto.: 480 144 352,

BLZ 800 537 62, Stadt- und Saalkreissparkasse Halle